# LA PACDEFENDANTO

N-o.50. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ČEĤOSLOVAKIO Februaro 1956


## RESUMO EL LA KONFERENCO EN OLOMOUC

La 10an tradician laborkonferencon de la Esperanto-rondetoj el la regionoj de Olomouc kaj Ostrava antaŭeniris Esperanto-seminario, kiu komencis la 3.de januaro kun prelego de s-ano St. Římský je temo "Spertoj če tradukoj en Esperanton". Li klarigis, ke čiu tradukanto devas komenci tradukadon kun granda pacienco kaj prudento. Li rekomendis traduki el nacia lingvo. Li klarigis la tutan sintakson de Esperanto laŭ vidpunkto de etimologia deveno de vortoj. Li parolis pri neologismoj kaj per kelkaj vortoj el la Esp-gramatiko li montris la karakteron de la aglutina lingvo. La 4.de jan. prelegis s-no M.Rudolf pri la I.datreveno de la UNESCO-rezolucio rilate Esperanton. Fine li indikis kiamaniere la čeĥosl.esp-istoj en 1956 plivastigu sian laboron por starigi pere de Esperanto amikecan, kulturan kaj sciencan kontakton kun la eksterlando. La 5.de jan. parolis s-ano.d-ro.Vlad.Mohapl, prez.de la Esp-klubo en Olomouc, je la temo: "Internacia lingvo de socialismo kaj komunismo". Li klarigis kiajn erarojn kaŭzis lingvistoj, kiuj ne koninte la gvidan ideon de nia majstro, interŝanĝis realaĵojn kaj klopodis senvalorigi la ideon de la internacia lingvo kaj suspekti ĝin pro politika fono. Sed la esperantistoj pruvis, per energia laboro por la tuto, ke ili celas nenion pli, ol helpe de la internacia lingvo atingi veran amikecon inter la nacioj de la tuta mondo. La lasta prelego, kiun havis s-ano M.Rudolf tenis: "Kiel propagandi Ĉeĥo... kion helpe de Esperanto." S-ano M.R. konstatis, ke bedaŭrinde la kompetentaj instancoj ankoraŭ ne montras por tiucele eldonenda literaturo komprenon.

La 6.de januaro venis al Olomouc tre šatataj gastoj; S-ano. Dobčnik Matko, redaktoro de "Kontakto" kaj s-anino I.Kočevar el Celje/Jugoslavio/. Ili estis kun granda ĝojo bonvenigitaj.

S-ano.J.Žid el Olomouc aranĝis en la kadro de la konferenco interesan ekspozicion de Esp-prpagandaj vitrokestoj.

La konferenco malfermiĝis per arango de artvespero la 7.de januaro kaj havis vere altrangan programon, prezentitan plejparte de aktoroj el la Opero en Olomouc. Čeestis pli ol 200 personoj.

Dimanče la 8.okazis la čefa labor kunsido, kiun partoprenis 153 delegitoj el 43 lokoj de Čeĥoslovakio. La kunveno komenciĝis per komuna kanto de la štata kaj esperantista himnoj. Naŭjara s-anino D.Parůžková el Rýmařov prezentis poemon kaj la prez.de la Esp-klubo en Olomouc, d-ro.Vl.Mohapl malfermis la programon per raporto pri la poresperanta agado en la regiono de Olomouc. La prez.de la komuna laborkomitato de la Esp-rondetoj en la regionoj de Ostrava kaj Olomouc, s-ano.V.Slaný raportis pri la farita laboro dum la pasinta jaro. S-ano.Dobčnik salutante la čeestantojn en la nomo de la jugoslavaj esperantistoj diris: "Ni devas konstati, ke la inter-štataj rilatoj pliboniĝas kaj ni povas kontribui al reciproka amikeco. En Jugoslavio ni atingis, ke Esperanto estas instruata kiel nedeviga objekto en la lernejoj. Al via konferenco mi deziras multan

sukceson kaj same al nia plua kun -laboro.

S-ano.Tvarožek raportis pri la malfavora situacio por Esperanto en Slovakio,kie la movado estas tute sen tradicio.Estis senditaj salutleteroj al s-ano T.Jung,red. de "HEROLDO de Esperanto",al d-ro Lapenna kaj telegramo al Sudanio. La diskuton partoprenis 19 gesamideanoj.S-ano.T.Kilián el Třebič proponis pripensi la eblecon de libertempaj interŝangoj de infanoj kaj plenkreskuloj inter ČSR k. Jugoslavio.S-ano.Fr.Lička el Ostrava instigis al porpaca laboro per Esp-o.Pri kurso kun 25 gelernantoj en Jeseník raportis s-ano. Pečinka kaj prof.Kožený pri sia traktado kun la Radio-stacio en Praha,rilate renovigon de Esperantlingvaj relacioj.

## EL LA LABORKUNSIDO DE "TKKE"

La 8.de januaro,paralele kun la konferenco en Olomouc,okazis tie ankaŭ kunsido de la Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista en Č. S.R.

Ĉeestis s-ano.Vítek J./prezid. de TKKE/,M.Rudolf/sekr./,profesoro J.Kožený/vicprez./,E,Tvarožek por la slovaka sekcio,d-ro.Vl.Mohapl /presservo/ kaj estraranoj gek-doj Evjáková,Matušová,Vondroušek,Lička Slaný kaj Kořínek.La junularon reprezentis s-ano.Kočvara.Kiel gasto ĉeestis s-ano Matko Dobčnik el Jugoslavio.El la kunveno rezultis jenaj decidoj:

1/ fondigo de scienca sekcio,gvidota de s-ano.d-ro.Jermář-Praha.
2/ Organiza sekcio/prof.Kožený/ preparos aligilon por UEA.
3/ La 41an Univ.Kongr.en Kopenhago partoprenos TKKE-delegitaro kaj E-kultur-delegitaro.
4/ Ĝisnunan duonoficialan organon de TKKE,"NIA SPEGULO"n anstataŭos nova bulteno "TKKE INFORMAS".
5/ Oni pritraktis proponon de Hungara TKKE rilate arangon de la IIa Danubvala Esp-konferenco tiusomere en Bratislava/ČSR/kaj decidis, ke s-ano.Tvarožek rekognosku ĉi aferon en Bratislava. TKKE-ČSR petas la Esp-asociojn de Hungario,Polio, Jugoslavio,Bulgario kaj Rumanio, diskuti la aferon kaj informi s-anon.M.Rudolf,Wanklova 14,OLOMOUC, ĉu ili akceptas tiun proponon kaj kian daton ili rekomendas por la arango de la Danubvala Konferenco.

## EL LA PAROLADO DE LA PREZIDANTO DE "TKKE" EN OLOMOUC

"Estis ĵus viaj regionoj Olomouc kaj Ostrava,kiuj neniam ĉesis la funkciadon,sed kontraŭe,ili servis kiel modeloj al aliaj regionoj de nia respubliko.Post la grava sukceso de Esperanto en UNESCO en dec.1954 kaj sekvanta fondiĝo de TKKE en jan.1955 en Olomouc,ni faris malgraŭ financaj malfacilaĵoj,dum la pasinta jaro gravajn paŝojn kaj novajn paŝojn ni preparas. Kun plena sento de respondeco mi diras:Mi dubas,ke ekzistas alia lando, krom Jugoslavio,kie la Esp-movado estus tiel vaste praktikata, kiel en ČSR. Post la traktado ĉe Ministerio de Kulturo mi povas promesi,ke estos restarigita la EAĈSR kaj estas nur demando de tempo,kiam denove ekfunkcios la "Verda Stacio".

Ni ne forgesu la laboron de la esp-istaj pacdefendantoj, sed ni memoru,ke ni estas nedividebla movado. Se iu esp-isto ne volus pacan kunvivon,li certe ne estas esperantisto. Ni faru ĉion,por ke la koncentrejoj kaj militoj ne plu ekzistu!"

Rim.de red.: Ĝis ĉi tie ni ĉerpis el informilo,ricevita de la sekretario de TKKE,M.Rudolf.

## KIEL NI RIGARDU LA AFERON ?

Pro troa okupiteco kaj ankaŭ financaj kaŭzoj,kiel gvidanto de la porpaca fako de TKKE,mi persone ne povis la priskribitajn kunvenojn partopreni.Povas esti,ke la kunvenoj procedis en bela kaj samideana harmonio,sed el la ricevitaj informoj tamen evidentiĝas,ke la afero,kiu plej okupas la mondcivitanojn,t.e.la defendo kaj sekurigo de la mondpaco, la batalo kontraŭ la preparoj de A-kaj H-bomb-milito,en tiuj kunvenoj ne havis la ĉefan lokon.

Oni decidis aligon al UEA, sed tute ne pripensis aligi al "MEM". Ni ne rifuzas aliĝi al UEA,ĉar estas ja en nia intereso kaj nia devo importi la ideojn pri pacdefendo en ĉiujn Esp-organizojn kaj en tiu senco kun ili kunlabori. Sed same kiel la hungara TKKE, la bulgara,pola kaj aliaj asocioj aligis al "MEM"por komune kaj sam -celo l...

la ĉeĥoslovaka TKKE tiel fari. Nia ĉefa celo ja ne nur povas est la disvastigado kaj propagando de Esperanto,sed ĝi devas havi multe pli profundajn radikojn,se ni volas ekflamiĝi la suferantajn korojn de la homaro. Kaj unu el la plej gravaj eblecoj por tio estas la praktikado kaj uzado de la lingvo por sukcese plenumi ties sopirojn.
K-do.Vítek,la prez.de TKKE, ĝuste diris: "Ni neforgesu la laboron de la esp-pacdefendantoj!" Sed,la laboro de la esperantistaj pacdefendantoj ne povas esti ne nur neforgesata,sed ĝi devas esti daŭrigata kaj ankoraŭ pli intensiviĝata,se ni ne volas denove perdi la post grandaj penoj kaj klopodoj akiritajn favorojn. Ne sufiĉas nur diri,ke ĉiu esperantisto volas pacan kunvivon,sed estas nepre necese,ke ankaŭ ĉiu esperantisto kontribuu al tio,ke tiu ĉi "paca kunvivo" estu al la homaro sekurigita! Por tiel kontribui,ne sufiĉas nur esti bona esp-isto, internacie rilati por interŝanĝi div.objektojn,verki poemojn, viziti konversaciojn ktp., sed aktive partopreni la batalon por la paco, fariĝi peranto inter la diversnaciaj pacorganizoj, transporti la pacajn ideojn al siaj ankoraŭ neinformitaj alilandaj gekorespondantoj,instigi ilin al partopreno en tiu batalo kaj helpi ĉie ajn,kie temas semi pacajn ideojn kaj batalon kontraŭ militoj.

Rudolf BURDA
prezid.de "MEM".

## U.N.E.S.C.O.- E S P E R A N T O KAJ ALIAJ INSTANCOJ

En iuj ŝtatoj oficialaj organoj ĉiam ankoraŭ stariĝas barojn kaj malhelpas la vivon de Esp-kultur-organizoj.Estas necese atentigi la respondecajn aŭtoritatojn, ke tia konduto kontraŭas la decidojn de UNESCO.Tiujn decidojn ankaŭ iliaj landoj,kiel membroj de UNESCO,almenaŭ laŭ demokrata vidpunkto devus ,kiel volon de plimulto,respekti. Se UNESCO deklaris la kulturan kaj porpacan utilon de Esperanto,kaj eĉ alvokis la ŝtatojn, raporti al ĝi pri Esperanto instru-ado,kontaktante pri ĉiuj agadoj kun UEA,certe ne estus konvena,se oni raportus/kaj UEA devus,eksci-ante tion/ ke ekzistas ankoraŭ ŝtatoj/membroj/ en kiuj oficialaj organoj malhelpas aŭ eĉ likvidas esp-kultur-kaj esp-pacorganizojn. Ĉu diversaj ŝakrondoj, dancgrupoj kaj fotoamatorklubo; rajtas vivi kaj funkcii kaj ĵus la de UNESCO aprobitaj Esperanto -grupoj ne? Ĉu tia raporto aperu antaŭ UNESCO ? Tion certe la "fervoraj" oficistoj ne pripensis!
Eble ili eĉ ne konscias pri tio ke iliaj ŝtataj reprezentantoj en la UNESCO-kunsido ne kontraŭis tion. Ili eble eĉ ne scias, ke iliaj registaroj,organizoj kaj packomitatoj celas ĉiamaniere kaj per uzo de ĉiuj rimedoj fortigi la internaciajn kulturajn rilatojn kaj sekurigi al la homaro la mondpacon.-
Necesas do, ke vi instruu ilin pri tio!
Supran raporton sendis al ni kiel"konfidencan" hungara kamarado. Sed la redakcio estas konvinkita,ke bona konsilo restas senvalora,se ĝi ne fariĝas publike konata.

## LENINGRADANĈJ INTERKONATIĜAS TRANS ĈEĤOSLOVAKIO

Hazarde nia redakcio trovis kontakton kun k-dino.N.Cvetkova el Leningrado,kiu plendis,ke ŝi estas tute sola komencantino en Esperanto,sen okazo konversacii kun iu. La redakcio tuj helpis,kaj nun ĝi ricevis jenan sciigon:
"Vi estis tiel bona,ke vi helpis en mia malfeliĉo kaj direktis min al k-do.Podkaminer,kiu estas ne nur mia plejproksima najbaro, sed eĉ lernejkamarado de mia mortinta onklo,kiu havas ankoraŭ multajn aliajn konatulojn.
Kiam mi interkonatiĝis kun k-do Podkaminer,ni devis ege ridi, ke nia interkonatiĝo okazis trans Ĉeĥoslovakio. - Jam mi studas en la Esp-rondo de la Universitato, nun mi devas multe legi,traduki kaj skribi,por firmigi mian scion en Esperanto.
Jen ekzemplo praktikenda. Ofte okazas,ke esp-ista najbaro ne scias pri esp-ista najbaro,samurbano ne konas samurbanon kaj samlandano ne estas informita,ke en div.lokoj de lia lando ankaŭ estas esp-istoj.
Ni do kontaktiĝu ilin reciproke kaj ni faros utilan laboron.

HELPU AL NEKONATA BATALANTO!

Ankaŭ jena interesa letero atingis nian redakcion:
"Kara kamarado!

El letero de polaj esperantistoj mi eksciis vian adreson kaj kun granda ĝojo mi skribas ĉi leteron. Kvankam mi estas malnova esperantisto/ekde 1914/,tamen bedaŭrinde mi scias nenion pri Espmovado dum la lastaj 18 jaroj.

Ofte mi revas pri estonta triumfo de Esperanto-movado en nia lando,pri kio mi firme kredas.

Mi petas vin,plej detale informi min pri esp-movadoj,sciigi al mi adresojn de esp-istoj en nia lando por ke mi povu kontakti kun ili.

Se eblas,sendu ankaŭ al mi vian "Pacdefendanton".

Andrej SIDOROV
Krjukovo,ul.Nekrasov 12, rajon Himki,Moskovskaja obl.Sov.Unio. "

Ni esperas kaj deziras, ke k-do.Sidorov ricevu krom la "LP" kaj informoj de nia redakcio,ankoraŭ amasojn da informoj kaj materialon,ne nur de sovjetaj k-doj sed ankaŭ el ĉiuj aliaj landoj, por ke li konsciiĝu fine,ke lia ŝatata revado jam fariĝas efektiva realaĵo.

NUR ANTAŬEN!

En Leningrado/S.U./fondiĝis Esperanto-studrondo konsistanta el sciencistoj-filologoj kaj studentoj,kiu havas la celon eduki instruistojn por tiujare ankoraŭ gvidi rondetojn de Esperanto en diversaj leningradaj lernejoj kaj institutoj.Ni sendas al la ĉeĥoslovakaj gekamaradoj korajn salutojn kaj bondezirojn.

S.Podkaminer/kursgvid./

RECENZO EL ARGENTINIO

Akceptu salutojn kaj bondezirojn por la jaro 1956. Ne regule alvenas al ni"LA PACDEFENDANTO". Ĝia enhavo estas tr interesa kaj multe plaĉas al niaj lokaj gekamaradoj. Daŭrigu en via nobla kaj ideala tasko!

Norman Oskar LUKE
BAHIA BLANCA-Argentin.

GRANDA SUKCESO EN BULGARIO

En la geknaba gimnazio de la urbo RUSE funkcias Esp-kurso kun 35 gestudentoj.Instruas profesoro Granĉarov. En la sama gimnazio oni preparas pluan kurson, al kiu jam aliĝis 60 gestudentoj.

Dimitr Ivanov
RUSE

VIDU L'ANIMON DE SOVJETA HOMO

Ni sentas la devon prezenti al vi leteron,kiun ni ricevis de kamarado el RIGA-Latvia PSR:

"Mi legis de vi eldonatan "LA PACDEFENDANTO"n kaj mi tre ĝojas pri via laboro en Esp-o.

Mi mem estas en Esperanto nur komencanto,sed al mia patro Esperanto estis idealo.Li estis esperantisto jam de 1933 kaj multe laboris por ĝi.Bedaŭrinde lia vivo finis en la jaro 1942, kiam germanaj faŝistoj agresis nian landon. Li mortis en malliberejo. - Sed lia laboro ne mortis !

Mia patra idealo,mia laboro por Esperanto,estis tiom arda, ke mi ne povas forgesi tion.

Mi ĵuras,ke mi daŭrigos lian laboron por Esperanto.

Mi batalos kun aliaj latvaj gekamaradoj,ke ankaŭ en nia respubliko fondiĝu Esperanto-movado.

Persone mi propagandas la internacian lingvon. Funkcias jam kurso kun 10 gejunuloj. Nur unu peton mi havas; helpu al mi,sendu adresojn por miaj lernantoj kaj alian materialon por la Esperanto -vivo.

Tre multe laboras kaj helpas al nia movado,malnova latva esperantisto,k-do.T.Arbergs. Mi estus feliĉa se mi regule povus ricevi "La Pacdefendanto"n.

Mi donacas por kovri la elspezojn de "La Pacdefendanto" sumon de 50 rubloj,kiun mi povas tuj al vi sendi,sed konsilu kiamaniere.

Kun korsaluto via samideano

Arvedo Vĕtra
Tallinas ielā 58-28,RIGA,Latv.PSR

Ni kredas,ke kun tiaj batalantoj,idealistoj - nia sukceso en Sovjet Unio estas garantiita.

NI RECENZAS:

"ESPERANTO V KOSTCE"de J.Ŝupichová Eldonis Esperantista Klubo-PRAHA II praktika ĉeĥlingva Esp-lernolibro, en kiu la aŭtorino Julie Ŝupichová donas al kursgvidantoj bonan gvidilon.M[illegible] ĉe J.Reiser,PLZEŇ,KrSS.

## LA II. ESP-KONFERENCO DE APUDDANUBAJ LANDOJ, TUTŜTATA KONFERENCO DE ĈEĤOSLOVAKAJ ESP-PACDEFENDANTOJ kaj LA II. INTERNACIA RENKONTIĜO DE "MEM".

Laŭ decidoj de nia I. konferenco en Otrokovice, la dua devus okazi en Bohemio kaj la III. en Slovakio. Sed ne eblas ĉiam, ĉion precize arangi laŭ la plano. Intertempe venis al la TKKE en Praha propono de la hungara TKKE por arangi internacian konferencon de apuddanubaj landoj tiu somere en Bratislava/ĈSR/. Nia klubo en Praha post interkonsilo kun la estraro de la ĉeĥosl. TKKE konsentis kun la budapesta propono kaj laŭ gia informo la gekamaradoj en Bratislava estas pretaj arangi la Danublandan konferencon.

En tiu kazo la TKKE estraro opinias ne konvena, arangi ankoraŭ apartan konferencon de esp-pacdefendantoj en Praha, proponitan de k-do. Burda. Ĝi rekomendas arangi la II. Tutŝtatan samtempe anj?aŭ en Bratislava. Certe ankaŭ ni opinias same, ĉar estus malfacila al multaj gek-doj viziti du konferencojn dum unu somero, kiuj ja ambaŭ devas procedi sub samaj devizoj kaj kun samaj celoj. Ni eliras el la vidpunkto, ke konferenco, kiun partoprenos gekdoj pacdefendantoj el ĈSR, Hungario, Bulgario, Polio, Rumanio, Aŭstrio, kaj eble ankaŭ alilandanoj, havos pli grandan efikon kaj valoron ol nura landa konfe-renco.

Ni jam petis niajn gek-dojn en Bratislava pere de k-do. Mil. Zvara, ke ili jam nun interkonsilu kaj faru preparojn arangi la II. Internacian Renkontiĝon de MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO en Bratislava paralele ku la Danub-landa konferenco. Ni kredas, ke BRATISLAVA estas tre konvena loko, ĉar en la ĉirkaŭsituitaj landoj troviĝas plejmulte da esperantistaj pacdefendantoj, kiuj garantias amasan viziton dume certe ankaŭ el aliaj landoj almenaŭ delegitaroj sukcesos alveni.

Dependas nun ĉefe de niaj kdoj en Bratislava, ke ili esploru la situacion kaj ĉiujn eblecojn kaj rapide informu nin pri la rezulto por ke ni povu komenci propagandon kaj informi niajn legantojn. Ni rekomendas la mon. aŭgusto.

---

### MOSKVA UZAS ESPERANTON

Oficiala raporto el "SUNDAY TIMES" de 22. januaro 1956.

La sekretario de Japana Popola Konsilantaro por restarigo de normalaj rilatoj inter Japanio, U.S.S.R. kaj Popola Ĉinio, skribis al Moskvo kaj Pekingo petante la subtenon de tiuj registaroj por la agado de sia organizo. La ofensivo komenciĝos la 17. de marto per grandega publika kunveno en Tokio.

S-ro. Molotov respondis telegrame kaj promesis la subtenon de la Sovjeta Registaro. Surprizo en tiu ĉi afero estas, ke la respondo estis farata en du lingvoj - angla kaj Esperanto. Jen la unua kazo, ke la Sovjeta Registaro rekonis Esperanton kiel internacian lingvon kaj ... la aliaj komunistaj registaroj baldaŭ faros same.

C. FIELDING -BRISTOL

### ESPERANTO EN LERNEJOJ

La ministerio por edukado en Hungario permesis instruadon de Esperanto en lernejoj.

La hungara radio stacio deklaris, ke estas preparo por la tempo kiam la sociaj kaj ekonomiaj bariloj inter la popoloj estos forigataj kaj universala lingvo fariĝos ebla.

### FINE ANKAŬ ĈE NI

La rektoro de la Teknika Altlernejo en Plzeň/ĈSR/ donis konsenton arangi Esperanto-instruadon en la lernejo, kondiĉe, ke la lektoro instruu senpage. La kursoj komencos tuj post fino de la vintraj vaganco. Krome estas preparoj por a... de ... lernejoj.

EL AŬSTRALIO

Ĵus finiĝis ĉi tie la balotoj por la tutaustralia parlamento. La rezulto estas denove tre perpleksa La plejmulto/70 %/ de Aŭstralianoj estas el la laborista/aŭ pres-kaŭ laborista/klaso. - Sed la laborista partio estis tamen venkita en la baloto. La antaŭa ĉefministro -R.G.Menzus/legu Memzis/denove tronas.Li estas tre kompetenta oratoro,sed tio,laŭ mi,estas lia sola atributo. Dum sesjara regado lia registaro faris nenion bonan. Ĝi legofaras nur favore al financistoj kaj komercistoj kaj tute ignoras laboristojn kaj pensiulojn. Cetere ĝi malŝpare elspezas njan ek-sterlandan monkrediton - laŭdire por defendo. Sed defendo temas pri armiloj - kaj armiloj temas pri la amikoj de la ĉefministro - la armilfabrikantoj. Do vi vidas,ke Menzus ne estas amiko de la paco - tute male. Efektive,li kaj liaj sam-pensuloj timas pacon.

Dume ni "ĝuas" ŝajnan prosperon-sed mi kredas,ke tio ne daŭros longe. Ĉu mi igas tro pesimisma?Bonvolu pardoni,sed mi nur povas paroli pri aferoj,kiel mi ilin komprenas.

Ĉu vi scias,kiu estas pesimisto? Jen la difino: PESIMISTO= Homo,kiu ekflarinte bonodoron de floroj,tuj ĉirkaŭrigardas atendante vidi ĉerkoveturilon!!! Jen alia difino: PESIMISTO= Homo,kiu vidas aferojn, kiel efektive ili estas!!!

Harold W.Adamo
Sud-Aŭstralio.

AMIKAJ ESPERANTO-

Kunvenoj en Hungario

La 12.de januaro festis amika rondo de proksimume 70 gek-doj en la "PACO"Esperanto-Rondo de Budapesto la 65.naskotagon de k-do.Julio Baghy.

En la feste ornamita ĉambro de la kulturhejmo post prolog-verso de k-do Balkányi k-do.Ludoviko Kökény diris festparoladon konigante la vivvojon kaj verkojn de la "paĉjo". Sekvis kantoj de M.Sárossy laŭ poezio de Baghy kaj ankaŭ deklamoj el liaj verkoj.Li men dankis kortuŝite la honoron kaj bonvolon,rakontante el sia vivo kaj klopodoj, kiuj-no celis farigi granda poeto,sed helpi la evoluon de la literaturo,ke la lingvo Esperanto fariĝu etapo por venontaj grandaj talen-toj.Saluton ankaŭ prezentis prof E.Farkas el Szeged.

La 19.de jan.estis memorkunveno pri la pola poeto Mickiewicz.Lian vivon,verkadon kaj poezion konigis Julio Baghy.La 26.de jan.estis lumbildparolado pri Islando. Sekvos vespero dediĉota al memoro de la germana poeto Heinrich Heine La programon arangos k-do.Kaloĉay

La 12.de februaro estos regiona kunveno en Esztergomtábor,kiun ĉeestos gek-doj el diversaj lokoj.

La Hungara Landa Esp-konsilantaro aliĝis al la Mondpaca Esperan-tista movado/MEM/,kiel ties reprezentanto kaj samtempe interrilatas kun UEA por helpi laŭ eble la internacian kulturlaboron ĉe la hungara nacia UNESCO-komisiono,petante agnoskon de kunlaboro.

P.Balkányi
BUDAPESTO.

REE ATAKU LA RADIOSTACIOJN !

Niaj hungaraj k-doj plendas, ke malgraŭ ilia alvoko,nur anglaj gek-doj petis elsendon de informoj pri Esperanto ĉe "RADIO-BUDAPEST". Ni denove atentigas niajn legantojn,ke la nuna situacio estas tre favora por efektivigi Esperanto-el-sendon ne nur ĉe Radio-Budapest, sed ankaŭ ĉe "Radio-Sofia", Radio-Praha,Radio-Warszawa,Bukaresti kaj eĉ en Moskvo kaj Leningrado.

Ne prokrastigu vian petskribon, sidiĝu kaj skribu tuj al ĉiuj nomitaj landoj.Sur la petskribo notu, ke gia teksto estas en Esperanto, ĉar ĉiuj radiostacioj kapablas traduki ĝin.Por la adreso sufiĉas: la nomo de la radiostacio kaj la lando.

GRANDA SURPRIZO VIN ATENDAS

/ĜIS NUN REDAKCIA SEKRETO/

sed por povi gin kiel eble plej baldaŭ realigi kaj prezenti ĝin al vi kiel fakton,estas al ni necesa mono.

Ĝis hodiaŭ nur eble 250 abonantoj,malgraŭ nia jam ripetita peto, nur renovigis siajn jarabonojn.Keliaj petis prokrastigon pro gravaj kaŭzoj.Tion ni aprobas,sed la redakcio ne povas konsenti,ke granda plimulto ankoraŭ ŝuldas. Rapidu

## KUN KIO MI NE POVAS KONSENTI

Kun intereso ni legis la artikolon de k-do.d-ro.J.Černý en la januara n-o.de "L.P." Ni priparolis ĝin en nia rondeto kaj 14 anoj decidis post fino de la kurso fondi traduk-rondeton.Ni intencas traduki romanon de Werne-Forman,kiu aperis en la gazeto"Věda a technika mládeže"sub titolo SIGNALOJ EL LA KOSMO.Ĝi estas interesa,nova, kaj ankorau ne aperis en libro.Ni dividos inter ni la gazetn-ojn kaj čiu tradukos parton kaj komune ni poste korektigos event.erarojn.Ankau ni povas traduki mallongajn ar-tikolojn el la fako de nia okupo.

Nepre ni konsentas kun vi,ke la homoj devas alkutimigi serči en Es-peranto čiuspecajn informojn. Jam nun,havante ankorau tre malperfektan eblecon,ni trovas en la E-gaz. tiajn informojn,kiujn oni trovas nenie alie.Mi eluzas ilin en mia laborloko,kie mi ofte devas respon-di la demandon:"Kio estas nova en Esperanto? Kiam venas mia vico en la 10minutaj diskutoj/klarigo de l redakcio:en ČSR estas kutimo,čiutage antau la laborkomenco,kunveno de malgrandaj laboristgrupoj en ki-uj estas diskutataj aktualajoj k. laborprocedo/en čiu entrepreno//. Precipe du el miaj raportoj estis klasifikitaj kiel"modelaj"La unua temis pri efikoj de l atombombo k. antau tri semajnoj mi eluzis la ekciojn el la konferenco en Olomouc petinte la čeestantojn,ke ili mem demandu pri kio ili interesas.Oni superšutis min kun demandoj,ke mi ne sciis al kiu respondi pli frue. Mi devis helpi al mi per čiuj miaj lingvosciој,historiaj kaj politikaj argumentoj.Tiam mi konvinkiĝis, ke estas necese,ke niaj anoj instruu sin tiurilate kiel eble plej multe.Mi rekomendus publikiĝi en L.P. diversajn delikatajn demandojn kiuj estas al ni ofte prezentataj de niaj kontrauuloj kaj samtempe la gustan respondon.El tia rubriko niaj anoj povus multe lerni.Ili mem gajnus sian internan certecon kaj venkus event.proprajn dubojn.

Kun kio mi ne povas konsenti, estas la komenco de lia artikolo, nome la frazoj:"Čar ni sciis trovi konvenan vojon al la oficiala ideologio. Certe okciden[illegible]e ekzistas ankau ideologioj - do necesas trovi ankau vojojn kaj lau ili agi!"

Tio šajnas al mi,kvazau la lingvo por esperantistoj estus la čefa afero; kaj tamen mi asertas, ke jus tiu či ideo kauzis la malbonan staton.

Male, ni oriente atingis la nunajn sukcesojn jus pro tio,ke kelkaj el ni - kaj oni devas diri,ke či tie temas precipe pri s-ano.Burda - atentis neniun alian ideologion krom la propran ideologion de Esperanto,la "Internan ideologion" pro kiu Zamenhof la lingvon kreis,t.e.paco kaj internacia amikeco.

Neniu povas diri,ke s-ano.Burda iam akomodiĝis al iu ajn oficiala ideologio.Male,ofte šajnis liaj artikoloj tro kuraĝaj kaj tamen la nuna bona stato estas precipe lia merito.Nur hazardo estas la fakto,ke nia ideologio iras saman vojon,kiun iras la ideologio oficiala. Servutemo neniam utilis por longa tempo kaj ĝi ne estas ankau hominda.Nur vero venkas, nur bona ideo estas vere fortika.

Kaj nia"ideologio estas tiel nobla,ke ĝi valorus eč kontrau la oficialan ideologion,se tiu ne havus la saman celon.Ĝi certe venkos en la tuta mondo kaj kun ĝi ankau nia lingvo.Nenian valoron kaj nenian esperon je venko ĝi havus,se ĝi ne servus al la "interna ideo".Bone diris s-ano. Vítek,la prez.de TKKE,dum la reg. konferenco en Olomouc,ke tiu,kiu ne volus uzi Esp-on por pacaj aferoj.ne meritas la nomon"esperantisto".

Marie BARTOVSKÁ
Slezan-MÍSTEK.

## SOVJETAJ GEK-DOJ ATENTU !

Vi povas abonpagi LA PACDEFENDANTON če jenaj k-doj en via lando:
Prof.E.A.BOKAREV,Institut Jazykoznanija,Volhonka 18/2,MOSKVA G 19,
Simon MKRTIČJAN,Ul.Gukasjan 19, EREVAN, Sovjet-Armenio,
Teodor ARBERGS,Lenina ielä 338-7, RIGA-6, Latvia S.S.R.

Per viaj abonkotizoj vi samtempe helpas starigon de oficiala Esperantista Pacmovado en Sovjet-Unio. Ni serčas ankorau reprezentantojn en aliaj Sovjetrespublikoj.

Če nia redakcio
**Ankorau eblas abonpagi:**

BULTENO-n de polaj esperant.13.-Kčs
BULTENO-n de bulg.esp-istoj.15.-"
Jap.virinan gaz."ČERIZO"por 5.-"

## DISVASTIGU NIAN PACLITERATURON!

En tiu senco tre vigle agas niaj japanaj gek-doj. Ili jam sukcesis, malgraŭ grandaj malhelpoj, eldoni multajn valorajn broŝurojn kaj librojn, kiuj grave kontribuas al nia pacmovado. Ni nur citu: "La polvo de morto" /pri Bikini/Hiroŝima" Ni nepovas silenti", "Karcero" kaj multaj aliaj. Nur tre malofte tiuj publikajoj atingas niajn europajn pacdefendantojn. Kaj tamen tiaj originalaj verkoj el lando, kiu jam spertis la atommiliton, Hiroŝima, Nagasaki kaj Bikini, kaj kie preskaŭ la tuta popolo energie kontraŭas la militinstigantojn, estas gravaj argumentoj por ili. Ĉar en multaj landoj oni ne povas aĉeti la publikajojn pro neebleco de monsendo, ni rekomendas al niaj legantoj ke ili mendu tiun literaturon pere de siaj jap. korespondamikoj kaj rekompencu ilin per abonpago de nia cirkulero por 1956. Multaj japanaj kaj alilandaj gek-doj tre ŝatus ricevi nian cirkuleron, sed la samaj financaj baraj ilin malhelpas.

Do, proponu al viaj amikoj en eksterlando kaj aparte en Japanio tiun ĉi sistemon de interŝango.

## PERE DE "L.P." SIN RETROVAS MALNOVAJ AMIKOJ.

Jen respondo je alvoko en nia novembra numero:

" - - - Estas tre interese: En la Informa Instituto de la Scienca Akademio de U.S.S.R. laboras mia edzino. Ĉiutage ŝi parolas pri diversaj temoj kun k-do., kiu ankaŭ estas esp-isto. Ne partoprenante aktive la restarigon de la Esperantomovado, li tamen multe interesas pri la lastaj novajoj kaj nia batalo por la mondpaco. Ĉi tiu esperantisto estas...plant-biologo k-do. Anatol VOLOĤOV ! Lin serĉis, pri li demandis en la novembra no. de "L.P." k-do. Koblischke el Wittenberge/Germanio/. Morgaŭ, lunde, mia edzino montros al k-do Voloĥov ĉi numeron. Jen okazos granda novajo por li! Sendube k-do. Koblischke ricevos baldaŭ revokon.

Ĉi tiu fakto estas ankoraŭ unu pruvigo de praktika fortikeco de nia internacia lingvo kiun kreis antaŭ 70 jaroj modesta okul-kuracisto d-ro. Zamenhof el Varsovio.

A.K.Savostjanov - MOSKVO

## "LA MONDO NE HAVAS ATENDEJON"

[illegible]

PUMP} naciolingven. En Ostrava oni arangis la scenarion kaj marde, la 7. de febr. je la 20. horo la scenon disaudigis la radiostacio PRAHA-I. por siaj ĉeĥoslovakaj aŭskultantoj. Ĝi daŭris precize 1 kaj 1/2 horon. La ĉeĥaj aktoroj bonege prezentis la rolojn de d-ro Clark, generalo Grenvay, prof. Thomsen kaj filo Ĝemsy, ingenero Benner, d-rino Mary kaj Anny la servistino. Nepre ĉiu aŭskultis la scenon kun streĉita spiro.

Temis pri laborantoj-sciencul-oj, kiuj sin okupis per produkto de dangera atomenergio "Pyradium", kies efikon ili unue esploris je bestetoj. D-rino Mary ege bedaŭris tiujn ĉi senkulpajn bestojn. Vorto al vorto formis diskutojn, kiuj fine vekis la konsciencon de ĉiuj laborantoj kaj kiam Ĝemsy la filo de la ĉefa respondeculo prof. Thomsen mem estis morte atakita de dangeraj "Pyradium"-radioj, eĉ lia patro, kiu ĝislaste rifuzis la riproĉojn de sia filo, kiu lin kulpigis pri produktanto de terura amasmortigado de miloj kaj miloj da senkulpaj virinoj kaj infanoj, farigontaj estontaj viktimoj de lia diabla invento, fine rifuzis daŭrigi la eksperimentadon kaj transdoni la sekreton de sia invento al la ŝtata milit-eksperto, generalo Bennero. La sceno certe postlasis ĉe la aŭskultantoj profundan malamon kontraŭ ĉiuj nukleaj armiloj.

Estus dezirenda, ke ĉiuj ĉeĥoslov. niaj legantoj, eĉ tiuj, kiuj ne havis okazon aŭskulti la scenon, petu ĉe nia ministerio de kulturo, ke tiu ĉi vere valora verko estu filmigita kaj prezentota al plejvasta publiko. Se ĝi estus akompanota de Esp-lingva teksto, tiu ĉi filmo certe gajnus la unuan premion dum la venonta internacia Film-festvalo. Samtempe tio signifus ankaŭ gravan pruvon pri la valoro de nia internacia lingvo.

R.BURDA.

## HUNGARAJ GEK-DOJ ATENTU !

Nia fervora hungara peranto, k-do Pál BALKANYI por adr. Magyar Nemzeti Bank, Fiokiroda, BUDAPEST-54, akceptas ankoraŭ pluajn abonantojn por "LA PACDEFENDANTO"

La jarabono por 1956 = 15.-ft.

La distribuadon en Hungario de nun prizorgadas k-dino. Margy KENESEI. Corvin Áruhaz, Blaha Lujza tér 1-2,

[illegible]

# NIA MOVADO EN ČEĤOSLOVAKIO

PLZEŇ, la 27.de januaro komencis nova kurso por komencantoj. Partoprenas ĝis nun 13 gelernantoj. Instruas k-do.R.Burda. La rondeto kunvenadas regule ĉiu vendrede de 18.horo en hotelo "Anglický Dvůr"/nun: Plzenský Dvůr,/Palackého náměstí. De la stacidomo rekte per tramo "Skvrňany".

OSTRAVA, la 15.de febr.komencis kurso por komencantoj de la 15. horo en Zámek-Vítkovice. De 16-17 funkcias kurso por progresintoj. Instruas k-do.Vladimír Slaný. La junularo kunvenas regule ĉiu merkrede de 18-20.horo.

MIKULOV, la rondeto de esperantistaj pacdefendantoj de la Distr. Packomitato varbis 5 novajn abonantojn por "L.P." Ĝi vigle laboras por la distribuado de nia cirkulero.

HORSKÁ BYSTŘICE, japanaj filmstrioj "HIROSIMA" kaj "INFANOJ DE LA ATOMBOMBO" estis prezentitaj al germanaj membroj de la Ligo de Ĉeĥoslovaka-Sovjeta Amikeco ĉe firmao "KORDA" en Litvínov-Most, Chabařovice, en Trmice kaj al anoj de la Distrikta komitato por Ĉeĥosl.-Sovjeta Amikeco en Teplice. La filmoj estis akceptitaj kun vere granda intereso de multe da auskultantoj. Kvankam ankorau multaj aliaj grupoj interesus pri la filmoj, ni devis ilin jam sendi al la plua petanto, kdo Solle en Žandov u České Lípy.

HRADEC KRÁLOVÉ, ĉiu merkrede de la 20.horo ni kunvenas en nova, bele ekipita kunvenejo "Dům Armády" en salono n-o.70. Ĉiu ĵaŭde de la 18.h. funkcias kurso por komencantoj en la Ekonomia lernejo. Partoprenas 22 gelernantoj Instruas prof.M.Lukáš. K-do. J. Eisenreich fondis 10membran rondeton en la Industria lernejo kaj k-do.Zd.Hršel instruas ĉiumerkrede al 8 studentoj de medicino.

BRNO, la rondeto kunvenadas regule ĉiu mardo de 19.30.horo en hotelo "SLOVAN", Lidická n-o.23. Por februaro ĝi starigis jenan programon: la 7/2. Jarkunveno, la 11/2. sabate, maskobalo, la 12/2. /dimanĉe/ Reg.konferenco de junularo, la 14/2. prelego "Meditado pri la vivo/kun diapositivoj/. La 21/2 prel. "6.000 km kiel nigra pasaĝero", la 28/2. VERDA MASKO invitas vin.

PARDUBICE, sub gvido de lernejinspektoro, k-do.Adolf Nozar fondiĝis traduk-rondeto kun 4 personoj. Ili nun tradukas verketon de prof.d-ro.Kron "Der kleine Deutsche". Ili intencas traduki ĉefe infanlibrojn. En Plzeň funkcias simila rondeto de 9 personoj, kiuj tradukas 378paĝan romanon de Karel ČAPEK "KRAKATIT". Por ke ne estu tradukataj duoble samaj verkoj, kontaktu kaj interkonsilu kun d-ro. J.ČERNÝ, Nám.Rep.22, PLZEŇ

## NI GRATULAS

al k-do.Karel JANDA el Králupy nad Vltavou kaj Libuše BEZLOJOVÁ el Jihlava, kiuj edziĝis la 21.de januaro 1956.
K-do.František MUDRA el Hrob u Duchcova edziĝos kun k-dino.Věra ŽELISKOVÁ el Horažďovice la 25. de februaro 1956.
Al ambaŭ paroj ni deziras feliĉan kumunan vivon kaj viglan partoprenon en nia movado.

## ILI DEZIRAS KORESPONDI:

En la Teknika Gimnazio de urbo RUSE funkcias kurso de Esperanto. La progres.lernantoj tre deziras korespondi. Skribu amase al: K-do.Stefan STEFANOV, ESPERANTO-KURSO, Teknika Gimnazio, RUSE, Bulg. Saman deziron havas k-do.Dobril Hristov Hristov, Str.Najden Kirov No.19, RUSE, Bulgario. Li speciale interesas pri vivo de popoloj, sporto, kino kaj interŝ.p.k.il.

## MUNICIO POR NIA BATALO

| | |
|---|---|
| K-do.A.Kulla-Martin....... | 2.-Kčs |
| K-do.J.Toufar-Brno........ | 3.-" |
| K-do.K.Svoboda-Mlýny...... | 4.-" |
| K-do.A.Trombala-Bohumín... | 4.-" |
| K-do.J.Rýznar-Čtyřicet Lánů | 4.-" |
| K-dino.E.Kučerová-Skačany. | 18.-" |
| K-do.S.Macek,kan.Mikulov.. | 15.-" |
| K-do.Ing.Jonáš-Ústí n/L.... | 4.-Kčs |
| K-do.K.Kraft-Obořiště....... | 4.-" |
| K-do.L.Beneš-Praha......... | 4.-" |
| K-do.J.Mazánek-Ostrava...... | 4.-" |
| K-do.J.Mlýnek-Ostrava....... | 10.-" |
| K-dino.A.Jermářová-Mar.Hory. | 4.-" |

/Daŭrigo sur lasta paĝo./

## K O R E S P O N D I   D E Z I R A S :

K-do.ČAŇ Břetislav,Vodní č.257, VÝŠKOV-2,Morava,Čehoslovakio,per leteroj,interš.il.p.k.kaj p.m. kun ĉiuj landoj.Certe respondas.

K-do.FILIP František,TROUBELICE č.16 u Uničova,Čehoslov./oficis/ pri ĉiuj temoj.Interš.il.p.k., gazetojn ktp.Mi ankorau ne kontaktis kun eksterlando,pro tio mi certe respondos.Do skribu!

K-do.Větra ARVEDO,Tallinas ielä 58-28,RIGA,Latvijas PSR, serĉas korespondantojn por siaj kursanoj en Riga,Sovjet-Latvio.

K-do.ŘEPKA Stanislav,Smirnovova 7,Stalingrad,OSTRAVA-Zábřeh,Čeho-slovakio,interš.il.p.k.kaj p.m. kun la tuta mondo.Certe resp.

K-do.Borislav VELEV,"Stalin" 5, GOCE DELČEV,Bulgario,serĉas gekorespondantojn por siaj 30 gekursanoj/16-18jaraj/.Resp.certa.

K-do.Dimiter IVANOV,"Bethoven"9, PLOVDIV,Bulgario,pri ĉ.temoj.

K-do.Avd GRAAF,Hendrikstraat 9, SLIEDRECHT,Nederlando,peras interšanĝon de p.m.por malsanuloj en sanatorio./100 kontrau 100/

K-do.NEUMAN Alois,Gorazdova 4, BRNO,Čehoslovakio/43jara/deziras interš.p.m.,il.p.k.,fotojn kaj spertojn kun fotoamatoroj el ĉiuj landoj.

K-do.NOVOSAD Josef,Alešova č.7, SVITAVY,Čehoslovakio,interš.il. p.k.kaj p.m.kun la tuta mondo.

K-do.KLIMEK Vlastmil,MALÉ SVATOŇOVICE č.203,Čehoslovakio,kun ge-kamaradoj el ĉiuj landoj.

K-do.MAJER Stanislav,TROUBELICE č.46 u Uničova,Čehoslovakio,kun ĉ.landoj pri ĉiu temo.Interšanĝ. il.p.k.,naciliingv.il.gazetojn k. librojn.Krome mi dez.korespondi itale kaj germane por perfektiĝi

K-do.Jerzy GRUM,Ul.Matejki 16 m. 8,WROCLAW,Polio/22j.stud./ pri film-kaj sport-temoj.Interš.il. p.k.kaj filmrevuojn.

K-do.SZABÓ Imre,Pamjanich út.51, ESZTERGOMTÁBOR,Hungario,/17jara stud./per il.p.k.kaj interš.p.m.

K-dino.TERENTJEVA Gala/f-ino./ Zacepa 28 kv.-3,MOSKVA,Sov.Unio, k.ĉ.l.per p.k.de urbvidajoj.

JUN.ESP-SOCIETO "JUNECO"aranĝos la 20.3.1956 letervesperon kaj ekspozicion.Sendu amase salutleterojn kaj esperantaĵojn al k-do Borislav VELEV,"Stalin"5, GOCE DELČEV,Bulgario.

K-do.KUDLIČKA Jan,Revoluční 203, VÝŠKOV-Dědice,Čehoslovakio,kun ĉ.landoj per il.p.k.Interš.p.m.

K-do.JURINA Ladislav,/14j./Žengrova 59,OSTRAVA-Vítkovice, Čehoslovakio,interš.il.p.k.,p.m. kaj alumetvignetojn kun ĉ.landoj

K-do.HVIŽĎ František,Přívozská 8 OSTRAVA-I.,Čehoslovakio,interš. p.m.kaj uzitajn il.p.k.de urboj. /kvanto kontrau kvanto/

K-do.ŠKUDERA Jan,Dukelské nám.27 PLZEŇ,Čehoslov.per fil.afr.aerleteroj.Interš.uzit.kaj neuzitajn p.m.kun Svisio,Austrio,Okc.Germanio,Okc.Berlino,Brit.Kolonioj,USA Jugoslavio kaj Hungario.Certe res.

## M U N I C I O   P O R   N I A   B A T A L O :

| | |
|---|---|
| K-do.J.John-Ostroměř....... 6.-Kčs | K-do.M.Stuhlý-Gbelce..... 4.-Kčs |
| K-do.L.Nemčok-Martin....... 9.-" | K-do.L.Rakyta-Klášter.... 1.-" |
| K-do.L.Nemčok-Martin paperon por....250.-" | K-do.Drunecký-Ústí n/L.... 4.-" |
| K-do.V.Hejda-Nové Strašecí.. 5.-" | K-do.K.Horák-Třebíč....... 4.-" |
| K-do.B.Sotek-Dětmanovice....10.-" | K-do.P.Trombík-Skřečoň.... 1.-" |
| K-do.J.Křivohlavý-Karl.Vary. 4.-" | K-do.J.Janků-Luhačovice... 4.-" |
| K-do.J.Ponča-Orlová-II...... 8.-" | K-do.C.Fišer-Ivančice..... 4.-" |
| K-do.d-ro.J.Černý-Plzeň.....19.-" | K-do.J.Skála-Plzeň....... 4.-" |
| K-do.Caletka-Nový Lískovec.. 4.-" | K-do.F.Skoupý-Sv.Kateřina. 4.-" |
| K-do.L.Proskovec-Plzen...... 3.-" | K-dino.F.Orelková-Otrokov. 8.-" |
| K-do.Ing.Rebíček-Havl.Brod.. 2.-" | K-dino.M.Hirschová-Brno... 4.-" |
| Esp.Rondeto-Liberec......... 4.-" | K-do.Fr.Hába-Vizovice.....34.-" |
| K-do.E.Belda-Tanvald........ 8.-" | K-do.J.Mařík-Praha....... 4.-" |
| | K-do.O.Vyhnal-Praha...... 8.-" |

Eldonis: OKRESNÍ VÝBOR OBRÁNCŮ MÍRU-odbor esperantistů-M I K U L O V
Redaktis:k-do.Rudolf BURDA,Palackého nám.6,PLZEŇ,ČEHOSLOVAKIO.